# NIA PONTO

Grupo Esperantista Kunven-tago:
Vendredo (7,30-9 h.) Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre ☎ 34-944.164.492
E-48005-BILBAO (Hispanio) ☎ portebla: 34-658.709.087
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es) 💻 esperantobi@gmail.com
TTT-ejo:

**Jar-kotizoj**: Normala: 20 €. Speciala: 15 €. Familia: 35 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**MARTO/APRILO 2010** **Nro. 82 (2/10)**

## ASAMBLEA GENERAL ANUAL


Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 14 de mayo**, a las 19,30 h., en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente
**Orden del día**:

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos correspondiente al año 2009.
3. Propuesta de elevación de las cuotas de socios para el año 2011.
4. Propuestas para la obtención de fondos con el fin de hacer frente a la colocación de un ascensor en el inmueble.
5. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2010.
6. Ruegos y preguntas.

## ĜENERALA JARKUNVENO.

Tiel kiel vi povas legi ĉi-supre, la **vendredon 14-an de majo** oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon. Se ĉiam via ĉeesto estas grava, ĉi-jare estas speciale grava, tiel ke la monproblemoj de la Grupo pligrandiĝos pro la instalo de lifto en la malnova konstruaĵo, kie situas nia Grup-ejo. Do, kun ĉiaj niaj fortoj ni alvokas vin: ĉeestu la kunvenon kaj helpu al pluvivado de nia 104-jara asocio!.

## LOKE ...




Kiel ni jam informis, oni eldonis, antaŭ kelkaj semajnoj, la hispanlingvan version de la libro "Laboristaj kronikoj", verkita de Antonio Marco Botella, kaj publikigita en 1996 de *SAT-Broŝurservo*, kiu pritraktas la historion de la laborista esperanto-movado en Hispanio, de la komenco ĝis tiu jaro.

La nuna libro aperis sub la nomo "Crónicas del movimiento obrero esperantista", kaj estas baze la sama libro, kun kelkaj aldonoj kaj malgranda ĝisdatigo, kaj en multe pli bonaspekta formato.

¡Aĉetebla en nia Grupejo!

Mizera prezo: nur 8 eŭroj.

## CUOTAS DEL AÑO 2010.

En breves fechas, procederemos al cobro de las cuotas del año 2010 a aquellos socios que las tienen domiciliadas a través de un banco o caja de ahorros. A los demás, os recordamos que, cuanto antes hagáis el pago, el primer beneficiado será nuestro Grupo. Las cuotas vigentes desde hace ya varios años son:

Cuota normal: 20,00 euros anuales.
Cuota reducida: 15,00 euros anuales.
Cuota familiar: 35,00 euros anuales.

## DAŬRIGAS LA KURSO POR KOMENCANTOJ.

Ĝi komencis la pasintan 9-an de oktobro kun 4 gelernantoj, al kiuj aldoniĝis 3 veteranaj membroj de la E-Grupo, kiuj deziris perfektigi sian lingvoscion. Vere agrabla kaj amika etoso atendas al kiu ajn homo, kiu emus perfektigi sian E-parolkapablon. Klasoj okazas ĉiuvendrede, inter la 19,30 kaj la 21,00 h.

Malgraŭ ke la kurso finiĝis la 26-an de marto, ĉiuj partoprenantoj interkonsentis plu kunveni kun la celo praktiki nian lingvon, do fakte la kurso daŭrigos ĝis junio.

Inter la gelernantoj estas planoj por fari diversajn agadojn dum la venontaj semajnoj: monto-ekskursoj, paroligaj rendevuoj en kafejo, partopreno en E-aranĝoj, ... Venu kaj aliĝu al la rondeto!!!.

**SE VI DEZIRAS RICEVI «NIA PONTO»-n PERE DE RET-MESAĜO,** skribu al la ret-adreso de la Grupo **esperantobi@gmail.com** por sciigi vian adreson al ni.

Vi ankaŭ ricevos nian revuon pere de normala poŝto, sed iom pli poste.

## DVD DISDONITA AL UNIVERSITATAJ BIBLIOTEKOJ.

La DVD “Esperanto y traducción. Utopía y realidad”, transdonita al nia Grupo de Rafaela Urueña kaj Luis Hernández, estis donacita al diversaj bibliotekoj de la Vaska Universitato, nome,

- Instruista Altlernejo de Bilbao.
- Centra Biblioteko de la Universitato, en Leioa (Bizkajo).
- Filologia Altlernejo (Vitoria).
- FICE (Altlernejo pri Filozofio kaj Instrusciencoj) (S. Sebastián)
- Instruista Altlernejo de Vitoria.

Tiu DVD, eldonita de Juan Miguel Zarandona, de la Universitato de Valladolid, enhavas la diversajn prelegojn, kiuj konsistigas doktorigan kurson de tiu Universitato, okazinta en Soria.

## MALFACILA MON-SITUACIO.

Kiel vi povas legi en la tagordo de nia venonta ĝenerala kunveno, baldaŭ oni instalos lifton en la konstruaĵo, kie situas nia E-Grupo. Entute, ni devos pagi ĉirkaŭ 10.000 eŭrojn. Tio ege malheligos nian mon-situacion.

Pro tio, ni alvokas vin ĉiujn partopreni tiun kunvenon por provi, inter ni ĉiuj, trovi iun solvon. Ni atendas vin. Ne forgesu: la **14-an de majo**, je la **19,30 h**.

## RENKONTIĜO DE VASKAJ ESPERANTISTOJ.

La 22-an de Majo, organizita de Nicolás Xil Carbalho, okazos en Donostio/S. Sebastiano la 6-a printempa renkontiĝo de vaskaj esperantistoj. Se vi interesiĝas pri la eventu, kontaktu rekte kun Nicolás Xil aŭ pere de nia Grupo.

## VENONTAJ E-KONGRESOJ.

02/05 julio. 69-a Hispana Kongreso. Santiago de Compostela.

17/24 julio. 95-a Universala Kongreso de UEA. Havano, Kubo.

24/31 julio. 66-a IJK (Internacia Junulara Kongreso). Sta. Cruz del Norte, Kubo.

21/28 aŭgusto. 77-a Itala Kongreso. Lignano Sabbiadoro, proksime de Venezio kaj Verono.

02/09 oktobro. 18-a Internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. Coma-ruga .

23/30 julio 2011. 96-a Universala Kongreso de UEA. Kopenhago.

(Kiel ĉiam, pliajn informojn vi trovos en nia Grup-ejo)

# H.E.F.

## REMALFERMAS LA MUZEO DE ESPERANTO.

Ekde la vendredo 9-a de aprilo denove funkcias la konata Muzeo de Esperanto de Sant Pau d'Ordal, nun nomata de Subirats (la municipo). Okaze de la reinaŭguro oni celebris kelkajn publikajn eventojn dum la semajnfino, kun ĉeesto de aŭtoritatuloj kaj amasmedioj. Ĝi nun apartenas al Rafael, filo de la karmemora Lluis María Hernández Izal.

*(Prenita el "Nia Voĉo", organo de madrida E-liceo. Aprilo 2010)*

## IBERIA RENKONTIĜO.

La 6-a Iberia Renkontiĝo okazis en Almagro, regiono La Mancha, de la 9-a ĝis la 11-a de aprilo. Ĝin organizis HEJS, la junulara sekcio de HEF, en bela historia konstruaĵo apartenanta al la Provinca Deputitaro de Ciudad Real. Kvardek partroprenantoj, plejparte junaj, ĝuis la lokajn historion kaj vinon, vizitis la nacian naturparkon Las Tablas de Daimiel, ludis, debatis, konis pri novaperintaj libroj, kaj spektis etan teatraĵon en la XVII-jarcenta Corral de Comedias, en kiu la geaktoroj aparte salutis nin la esperantistojn.

Pri la evento bone raportis la du provincaj ĵurnaloj, kelkaj regionaj televidkanaloj kaj la hispana nacia radio RNE.

*(Prenita el "Nia Voĉo", organo de madrida E-liceo. Aprilo 2010)*

## RETA INFORMILO.

La 20-an de aprilo estis sendita la unua numero de la nova retinformilo de HEF. Ĝi utilos kiel rapida informilo dum aperas la tradicia dumonata "Boletín".

## ĈIUJ VOJOJ KONDUKAS AL SANTIAGO ...

La 69-a Hispana Kongreso, organizata de Hispana Esperanto-Federacio kaj Galega Esperanta Asocio, okazos inter la 2-a kaj 5-a de julio 2010 en la antikva galega urbo Santiago de Compostela, fama ekde mezepoko kiel celo de la Jakoba Vojo.

Provizora programo inkluzivas prelegojn, muzikan koncerton, ekskurson tra la urbo kaj E-diservon en la Katedralo post mallonga pilgrimado. Oni ankaŭ organizos ekskurson al Padrón kaj al muzeo-domo de Rosalía de Castro, kun posta ŝipveturado tra la estuaro Arousa kaj rivero Ulla.

## LAŬTLEGADO DE "DON KIĤOTO".

Okazis la ĵaudon 22-an de marto, kadre de la ĝenerala legado de tiu verko en "Círculo de Bellas Artes". Eblas spekti la legadon ĉi-tie:
Faustino Castaño: http://www.youtube.com/watch?v=k8o4gqcjvQU
Miguel Fernández: http://www.youtube.com/watch?v=dhJfdOB9C0Y
Manuel Pancorbo: http://bitakoro.blogdns.org/

*(Informis T. del Barrio kaj M. Pancorbo)*

# TRA LA MONDO ...

## Libroj elŝuteblaj ĉe kiosko de "La Ondo de Esperanto".

Hodiaŭ, la 25an de februaro 2010, en la retejo de "La Ondo" / "Sezonoj" (http://www.esperanto.org/Ondo/) aperis la rubriko Nia kiosko, en kiu nun oni povas senpage elŝuti la februaran kajeron de "La Ondo de Esperanto" (formato pdf) kaj du librojn: Aleksandr Pusxkin. "La pika damo" kaj Anton Ĉeĥov. "Sveda alumeto"

La libroj estas en la formatoj "pdf" kaj "epub". La formato "pdf" estas oportune legebla en diversspecaj komputiloj helpe de la senpaga legoprogramo Adobe Acrobat kaj aliaj similaj programoj. La formato "epub" estas la plej populara formato de "inkllibroj", kaj ĝin oni povas legi per pluraj (sed ne ĉiuj!) specoj de elektronikaj legiloj (angle: eReader). Oni povas legi inklibrojn ankaŭ en komputilo helpe de la senpaga programo Adobe Digital Editions (http://www.adobe.com/products/digitaleditions/). Kelkaj pliaj libr(et)oj iom post iom estos enretigitaj.

La libroj dum kelkaj monatoj estos senpage elŝuteblaj por privata legado. Oni ne rajtas pludistribui nek publikigi ilin, plene aŭ fragmente, en papera aŭ elektronika formo. Poste elektronikaj libroj de "Sezonoj" estos aĉeteblaj ĉe internacia retbutiko, kiu nun estas konstruata kaj testata. Adreso de la kiosko:http://www.esperanto.org/Ondo/Libroj/Libroj.php

*(Miguel Gutiérrez Adúriz. 25/02/2010)*

## FAVORA RAPORTO PRI E-O EN LA BRAZILA DEPUTITEJO.

Anonciĝis hieraŭ la favora raporto de deputito Andreia Zito, de la brazila Deputita Ĉambro, por la aprobiĝo de Esperanto-projekto. Ŝia ŝanĝo en la projekto jam aprobita en la brazila Senato rilatas nur al la termino "grade curricular" (lernobjekta listo), kiun ŝi konsideras malmoderna kaj ne plu uzata de pedagogoj. Ŝi proponas esprimon, kiu estas tradukebla jene:
" 6a. par. - Esperanto konsistigos elekteblan eron en la lernobjektaro de mezlernejoj kaj estos deviga la disponigo de ĝia instruado se la postuloj tion pravigos."

Mi ne scias ĉu ĝi devos reiri al la Senato pro la ŝanĝo au tion oni konsideros simpla teknika redaktaĵo, kiu ne modifas la spiriton de la jam aprobita projekto. Mi malsupre kopias kaj tradukas ŝian voĉoraporton, kiu estas nelonga:

*"Esperanto estas lingvo, kiu kunportas valorojn de la monda paco kaj integriĝo inter landoj kaj ĝi naskiĝis laŭ la utopio fariĝi lingvo komprenebla por ĉiuj popoloj. Temas pri faciligilo por la interrilatoj inter la popoloj.*

*Ne deveninta de specifa popolo, ĝi forpuŝas la riskon de provoj pri kultura koloniigo aŭ superregado. Cetere la kriterioj aplikitaj al Esperanto konsistigas ankaŭ bonegan ekzercon pri logiko,*

*kiu povos pliriĉigi la sciaron de lernantoj. Ellaborita per radikoj de malsamaj lingvoj, ĝi povas instigi la lernantojn al pli profunda lernado de lingvoj.*

*Kiel emfazis la debato en la Senato, Unesko aprobis rezoluciojn kun la celo instigi la disvastigon de Esperanto. Ni aldonas raportistan amendon por forigi la esprimon "lernobjekta listo" , ĉar la termino "lernobjekta ero" estas klariga kaj pli eleganta ol "listo" (grade) – esprimo ĝenerale forpuŝata de pedagogoj, kiuj ligas ĝin al lernobjektaro tro severa kaj eĉ al lernejaj medioj malfavoraj al la ludopensado. Pro la supraj kialoj, mi voĉas por la aprobiĝo de Leĝoprojekto n-ro 6.162, de 2009, kun la raportista amendo".* Deputitino ANDREIA ZITO.

*(Sendis: James Rezende Piton, UEA-Ĉefdelegito por Brazilo. 16/04/2010)*

# KONTRIBUOJ

*(Artikolo tradukita el la angla de nia samgrupano José Pérez-Salado Kamps kaj sendita la 23/03/2010)*


## Respondo al: "eŭropocentra" Esperanto.

Lingvo estas strukturo, kaj la strukturo de Esperanto ne estas tre eŭropa. Klara indiko de vortaj kategorioj, gramatikaj kazoj; neekzisto de gramatika genro; vortaj radikoj kiuj neniam ŝanĝiĝas (nenia fleksio); finaĵoj kiuj ĉiam portas la samajn signifojn; kombinoj de vortoj kun partikuloj aŭ aliaj vortoj, tiel ke oni povas kompreni la signifon de la kombino el la signifo de la komponantoj (kaj esti certa pri tio ke oni estas kompreninta ĝuste), gramatikaj reguloj kiuj ĉiam estas aplikeblaj – ĉiun Esperantan regulon kiun oni estos lerninta, oni povos apliki ree kaj ree, sen la mallogikaj esceptoj kiujn la "naturaj" lingvoj havas en senlima kvanto, ktp. ktp. La eŭropaj lingvoj kutime apogas neniun aŭ maksimume du el tiuj ĉi karakterizaĵoj – Esperanto havas ilin ĉiujn.

La vortoj estas nur la materialo kiun iu ajn lingvo bezonas por funkcii (kaj ili povas facile esti ŝanĝitaj se necese), sed male al la eŭropaj lingvoj, [en Esperanto] la finaĵoj aŭ aliaj vortoj estas "gluataj" al radiko sen iam ajn fleksii ĝin (en la angla tamen, la radiko de "live" ŝanĝiĝas de liv- al lif- en certaj formoj). La radikoj de Esperanto havas bone difinitajn signifojn kaj estas selektitaj precipe el la tiel nomataj internaciaj vortoj (t.e. vortoj disvastiĝintaj en multaj lingvoj), kiel ekzemple Esperante "direktor-" (angle: director; france: directeur; japane: dairekutaa).

Ĉirkaŭ 70% el la radikoj de Esperanto (kaj ĉirkaŭ 50% el la radikoj de la angla) havas sian originon en la romidaj lingvoj, sed tio ĉi ne faras el Esperanto eŭropan lingvon, ĝi nur kaŭzas ke Esperanto ŜAJNU eŭropa lingvo. Pro ĝia efikanta gramatika strukturo ĝi povas esti lernata facile fare de homoj el la tuta mondo – la deveno de la radikoj ne estas tiom grava.

*(Sendita de Elmar Duensser la 12-an de Marto 2010 je 12:55 posttagmeze)*



## **La nova modo: -ujo.** (Anna Löwenstein, Italujo)

Kial mi insiste pludiras *Germanujo* kaj *Italujo*, kiam ĉiuj aliaj preferas *Germanio* kaj *Italio*? Nu, pro pluraj kialoj. Parte ĉar -io ŝajnas al mi stranga finaĵo, ne kongrua kun la simpleco kaj reguleco de Esperanto. Pli pri tio poste. Sed plejparte ĉar mi ne eltenas la konfuzon, kiun la finaĵo -io alportis al la landonoma sistemo en Esperanto. Kia konfuzo? Hmm, kiel klarigi la landonoman sistemon en unu alineo? Mi jam dediĉis al tiu temo tutan libreton. Sed mi faros mian eblon klarigi rapide.

La landonomoj en Esperanto estas dividitaj en du grupoj. Unu grupo sekvas la modelon *Usono, usonano*, la alia sekvas la modelon *Britujo, brito*. Multaj esperantistoj, kompreneble, preferas uzi -io anstataŭ -ujo, kaj do diras *Britio*. La problemo estas, ke ankaŭ en la unua grupo (*Usono, usonano*), multaj landonomoj finiĝas per -io, ekzemple *Alĝerio, Aŭstralio, Namibio, Kolombio*. Do, kiam oni renkontas landonomon, kiu finiĝas per -io, kiel scii, ĉu ĝi sekvas la modelon *Usono, usonano*, ĉu la modelon *Britio, brito*? Tio gravas, kiam necesas formi la nomon de la landano, ĉar en la unua kazo necesas aldoni -ano al la radiko, dum en la dua necesas forigi la -i-.

Kiam la plejmulto da esperantistoj uzis la finaĵon -ujo por landonomoj de la dua grupo, ne estis problemo. Ĉiuj esperantistoj (eĉ tiuj, kiuj preferis -io) sciis, al kiu el la du grupoj landonomo apartenas, kaj do senprobleme sciis formi la nomon de la landano. Sed nun, bedaŭrinde, kiam preskaŭ ĉiuj uzas -io, la distingo inter tiuj du grupoj perdiĝis, tiel ke multaj esperantistoj ne plu komprenas kiel la sistemo funkcias; efektive iuj ne plu komprenas, ke entute ekzistas du-parta sistemo. Rezulte, oni tre ofte renkontas erarajn formojn, ekzemple *aŭstralo* aŭ *Israelio*. (Se vi ne komprenas, kial tiuj estas eraraj, bonvolu legi la pli detalan klarigon en mia libreto *Konciza klarigo pri la landonomoj en Esperanto*).

Sed krome, la finaĵo -io kunportas plurajn aliajn problemojn. Ĉu la -i- estas sufikso? Ĝi ne similas la aliajn sufiksojn en Esperanto, kiuj normale havas la formon V+K (vokalo plus konsonanto) aŭ V+KK. Krome, ĝi kondutas iom malsame: malkiel la aliaj sufiksoj oni ne povas uzi ĝin memstare.

La vortelementoj en Esperanto normale estas kunmetitaj laŭ travidebla maniero. Ni ĉiam emfazas tiun fakton en nia reklamado: kiam ni volas konvinki la homojn lerni Esperanton, ni donas ekzemplojn kiel *mal-jun-ul-in-o* aŭ *nask-iĝ-tag-o*. Tiuj kunmetaĵoj estas facile analizeblaj kaj ĉiu elemento havas sencon. Sed kion diri pri la -i- en *Francio*? Certe ne ekzemplo, kiun ni povus uzi en nia reklamado!

Mi foje aŭdas la kritikon, ke la sufikso -uj- havas tro da signifoj en Esperanto. Nu, ĝi ja havas tri malsamajn signifojn – kaj tamen, multe malpli ol -io, kiu kondutas vere ĥameleone en Esperanto. -io foje estas uzata:

- por la nomo de scienco, ekzemple *astronomio* aŭ *biologio*, kontraste kun la nomo de la sciencisto *astronomo* aŭ *biologo*;
- por la nomo de ĥemia elemento, ekzemple *ejnŝtejnio, mendelevio* surbaze de la personaj nomoj *Ejnŝtejno, Mendelevo*;
- por la nomo de regosistemo, ekzemple *demokratio* aŭ *monarĥio*, kontraste kun la vortoj *demokrato* kaj *monarĥo*;
- por diversaj aliaj ismoj kaj ecoj, ekzemple *stenografio, pederastio* kontraste kun la vortoj *stenografo* kaj *pederasto*;
- kiel unu el la korelativoj;
- (sen la fina -o) kiel infinitiva finaĵo de la verbo.

Mi scias, ke multaj esperantistoj ne ŝatas -ujo pro ĝia baza signifo kiel entenujo. Kaj do? Ĉu persona ŝato aŭ malŝato rilate al iu elemento en Esperanto donas la rajton modifi la lingvon – precipe kiam tiu modifo detruas la logikon de unu el ĝiaj sistemoj? Cetere, mi mem uzas -ujo multe pli ofte en landonomoj ol en vortoj kiaj *laktujo, sukerujo* ktp., do por mi tio estas ĝia ĉefa signifo.

Aliaj esperantistoj kontraŭstaras la finaĵon -ujo pro etnismaj kialoj. Ili argumentas, ekzemple, ke ilia lando ne nomiĝu *Hispanujo*, ĉar tie loĝas ne nur hispanoj, sed ankaŭ katalunoj, eŭskoj kaj aliaj. Laŭ ili, tiu problemo malaperas, se la lando nomiĝas *Hispanio*. Ĉu vere? Al mi tio ŝajnas nura ĵonglado per vortoj, pli precize per sufiksoj: provo solvi politikan problemon per manipulado de la lingvo. Farante tion, oni neniel ŝanĝas la situacion de la katalunoj kaj eŭskoj, sed oni ja terure fuŝas la regulecon de Esperanto.

Per la uzo de -i- oni forglitas de la facila analizebleco, kiu estas ĉefa trajto de Esperanto, al nedisigeblo simila al tiu, kiu regas en la nature evoluintaj lingvoj. Certe, iuj neregulaĵoj jam ekzistas en Esperanto: pensu pri la serioj *redakti, redaktoro, redakcio*, kaj *poeto, poemo, poezio*. Tiuj tri-vortaj serioj evidente havas komunan fonton, sed la elementoj ne povas esti disigitaj; efektive la lasta konsonanto de la radiko eĉ estas modifita. Tiuj ekzemploj, bonŝance, rilatas nur al unuopaj vortoj, kaj do ne havas sekvojn por la baza funkciado de Esperanto. La situacio estas multe pli serioza, kiam tia neanalizebleco trafas tutan sistemon, t.e. la sistemon formi la landonomojn.

Mi rimarkas kun plezuro, ke -ujo komencas iometete reaperi. Interalie, unu el la estraranoj de UEA lastatempe ekuzis ĝin, konvinkite de la argumentoj en la libro *Rusoj loĝas en Rusujo*. Multaj esperantistoj efektive komprenas, ke -ujo estas pli logika ol -io, sed ili hezitas mem uzi ĝin, ĉar ili trovas ĝin "eksmoda". Nu, modoj povas ŝanĝiĝi, ĉu ne? Se vi opinias, ke -ujo estas pli bona ol -io, kuraĝu ekuzi ĝin! Estu en la fronto de la nova modo!

Por pli da informoj pri la finaĵo -ujo, vidu:

*Rusoj loĝas en Rusujo: landonomoj en Esperanto. Corsetti, Gubbins, Wennergren, de Kock, Vaha, Butler, Camacho k.a*. Federazione Esperantista Italiana, Milano, 2007. La libro estas ankaŭ legebla kaj elŝutebla ĉe:

http://www.bonalingvo.it/index.php/Rusoj_loĝas_en_Rusujo,_Landnomoj_en_Esperanto.

*Konciza klarigo pri la landonomoj en Esperanto: kun kompleta listo de landoj kaj landanoj.* Anna Löwenstein. Palestrina, 2009. La libro estas ankaŭ legebla kaj elŝutebla ĉe: http://www.bonalingvo.it/docs/klarigoprilandonomoj.pdf.

*La landonomoj – pli simplaj ol vi supozas!* 37-minuta parolado de Anna Löwenstein spektebla ĉe: http://www.ipernity.com/doc/29075/5145769 kaj ĉe: http://www.vimeo.com/5030540.

*(Sendita de Renato Corsetti. 26/02/2010)*